

Boletín

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

31º HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Alicante.-Rambla Méndez Núñez

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Director:

Domingo Martínez Benavente

Redacción y Administración:

Inés Gastón

Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.
ZARAGOZA

ADRESOJ

Hispana Esperanto-Federacio:

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque

Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Generala korespondado:

Sekretario:

S-ro Manuel Figuerola Palomo

Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Monsendoj:

Kasisto:

S-ro Raimundo Ibáñez Crespo

Str. Princesa, 78, 2.º
MADRID-8

Cekkonto: N.º 24.692/10,

Banco Ibérico

Avda. José Antonio, 18
MADRID-14

Sendaĵojn pri statistiko kaj

informado al:

S-ro Salvador Aragay

Str. Bassegoda, 40, 3.º, 1.ª
BARCELONA-14

Libroservo kaj Eldona-Fako:

Fino Inés Gastón

P.º Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.

Cekkonto: N.º 17917, Banco Bilbao

Coso, 31 ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komunikoj; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

de Secretaría

DONANTES DEL FONDO DE ADQUISICION LOCAL EN PROPIEDAD (F.A.L.P.)

Saldo anterior ...	49.600	ptas.
Asociación Esperantista Ferroviaria Española (H.E.F.A.) ...	1.000	"
Esperanto-Fako del Club Amigos de la Unesco ...	1.000	"
Miguel Vilagrán Llorens .	500	"
Josefo Anglada Prior .	500	"
Anónimo ...	1.000	"
	53.600	"

Madrid, 20 de marzo de 1971.

Manuel Figuerola Palomo

Secretario de la Federación
Española de Esperanto

deziras korespondi

✕ USSR., Estonio. — 202532 Törva, Riiska 4, Lembit Tangsoo deziras korespondi kun hispanaj esperantistaj geamikoj.

✕ JAPANUJO. — Okidome Ikanuga Jkanuga Nara, Sro. Yatsuo Yamaguchi 60-jaraĝa instruisto deziras korespondi kun hispanaj esperantistoj.

✕ POLLANDO. — Tarnawskie Góry, ul. Armii Czerwonej 2 m. 5, Sro. Aleksander Czastkowski deziras korespondi kun hispanaj esperantistaj amikoj.

KUBO. — La Habana 5, Pasaje General Lee 6, Sro. René Valdés López, 22-jaraĝa deziras korespondi kun hispanaj esperantistaj amikoj.

✕ GDR. — 214 Anklan, Südstadt Bl. 24 Aufg. III, fraŭlino Helga Olschewski deziras korespondi kun hispanaj gesamideanoj.

Mendu jam:

Afiŝojn de la 31ª H.E.K., 10 ptoj. unuo.

Glumarkojn de la 31ª H.E.K., folieto ses glum., 3 ptoj.

Poŝtkartojn de la 31ª H.E.K., 3 ptoj. unuo.

Kovertojn kun teksto: Esperanto, Internacia Lingvo aŭ Esperanto La Lingva Internacia, deko 5 ptoj.

Esperanto-insignojn glueblajn rondajn, ovalajn kaj stelformajn, 10 ptoj. unuo.

Esperanto-insignojn butonajn kaj stelformajn, 8 ptoj. unuo.

Bulkrajonojn rememorigajn de la 53ª U.K. en Madrid, 10 ptoj. unuo.

MANIFESTACIONES DEL PRESIDENTE DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO DE CARA AL XXXI CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

El año pasado, en el número correspondiente a los meses de marzo y abril, del Órgano Oficial de la Federación Española de Esperanto, expuse mis impresiones en relación con lo que habría de ser el XXX Congreso Español de Esperanto a celebrar en Mieres del Camino. Ahora tengo la certeza de que aquellas aseveraciones, llenas de confianza en el halagüeño resultado del Congreso y en una feliz e interesante estancia para los Congresistas, se cumplieron satisfactoriamente, sin que nadie de cuantos asistieron, se hayan sentido defraudados.

Hoy, desde estas páginas, me dirijo nuevamente a los señores socios de la Federación, a todos los esperantistas españoles y a cuantos se interesan, en el extranjero, por el movimiento esperantista español, para invitarles a que se adhieran cuanto antes, al XXXI Congreso Español de Esperanto, que tendrá lugar en Alicante, del 19 al 24 del próximo mes de Julio, y ruegos su participación en el mismo con su asistencia personal y su colaboración activa. Y lo hago con firme fe, en que también esta vez, puedo asegurar a todos que el XXXI Congreso Español de Esperanto constituirá un acontecimiento de suma importancia, con categoría suficiente para figurar entre los más notables de la historia de los Congresos Españoles de Esperanto y será de inolvidable recuerdo para los Congresistas.

Este optimismo mío, no descansa en ficciones, sino en hechos reales.

El Comité Local organizador, formado por Esperantistas con experiencia y entusiasmo, que acaban de fundar el grupo Esperantista de Alicante, dispuestos a realizar una intensa propaganda en favor de la difusión del Esperanto, prepara un interesante programa de actos, incluyendo recepciones, conferencias, visitas culturales y excursiones turísticas.

La Junta Directiva de la Federación confía en la asistencia de un buen número de asociados a la Junta General ordinaria de la Federación, que será convocada para su celebración en uno de los días del Congreso, según es norma. En este acto, reservado a los señores socios de la Federación, podrán ellos formular las críticas que consideren necesarias, con tal de que estas sean constructivas, sobre el desenvolvimiento de los fines de la Federación, la actuación de su Junta Directiva y de los servicios especiales. Asimismo, podrán presentar proposiciones y sugerencias para su discusión e incorporación, en forma de acuerdos, a las actividades de la Entidad.


Las cuatro secciones de la Federación: Jóvenes, esperantistas ciegos, esperantistas ferroviarios y turismo, podrán tener reuniones de trabajo, si sus Presidentes lo consideran oportuno, atendiendo al número de asistentes.

Por último, la Ciudad de Alicante, cosmopolita dentro de sus reducidas dimensiones, a la par que española por los cuatro costados; moderna y hermosa, a la vez que cargada de historia; definida desde los más remotos tiempos por la blancura y luminosidad de su paisaje, enclavada en tierras productivas, ante todo por la laboriosidad de sus habitantes, joviales, inteligentes, industrioses y artistas, extendidas entre el mar y las cadenas montañosas, elementos que contribuyen a dotarlas de fisonomía propia con rasgos geográficos de insuperable belleza; esta ciudad, la ACRA LEUCA de los cartagineses o la CASTRUM ALBUM de los romanos, codiciada y disputada por moros y cristianos, castellanos y aragoneses al correr de la Reconquista; esa ciudad alegre y acogedora, va a vivir por primera vez la experiencia de ser sede de un Congreso Español de Esperanto, y por lo tanto, la expectación que despierta la presencia de los Congresistas será extraordinaria y objeto de la mayor atención por sus moradores; eso hace necesario que nuestra lengua internacional sea escuchada mientras dure el Congreso en todas partes, dominando sobre la Babel que diariamente se produce por la afluencia de los turistas extranjeros. Para conseguir este efecto, recomiendo y aún ruego a los esperantistas españoles y a los simpatizantes que acudan masivamente al XXXI Congreso Español de Esperanto, para garantizar su éxito, compensar los desvelos del Comité Local Organizador, probar la utilidad del Esperanto en las relaciones humanas y gozar de la hospitalidad y los atractivos que ofrecen las tierras alicantinas.

Andaduras de Alicante

Hemos estado cuatro días visitando la ciudad de Alicante y bañándonos en sus cálidas aguas mediterráneas de las playas del Postiguet, La Albufera y San Juan, siendo nuestro deseo visitar los principales lugares turísticos de la provincia. Hemos oído hablar de Benidorm, de Elche, de Alcoy... Nuestros amigos nos han recomendado que no dejemos de visitar Orihuela, Santa Pola, Torrevieja, etc., y ante los carteles de una agencia de turismo, quedamos indecisos sin saber que camino hemos de elegir, que nos muestre lo más bello y típico de la provincia. ¿Elegiremos la carretera que paralela al mar bordea la costa, llenándonos los ojos del azul de la inmensidad mediterránea y dejándonos mecer por sus mansas olas, o bien nos internaremos en los pinares de Torre Manzanas para llenar nuestros pulmones del bálsamo purificador de sus pinos, y renovar, cuerpo y espíritu con su fragancia de bosque? O más bien nos iremos a la soledad de la montaña, buscando la tranquilidad que falta en la ciudad y dejándonos impresionar por sus maravillosos valles y desfiladeros y admirando la grandiosidad de la Carraqueta hasta llegar a la industriosa ciudad de Alcoy.

A 23 kilómetros de la capital se halla la industriosa ciudad de Elche con sus famosos bosques de palmeras, únicos en Europa, que le imprimen un carácter exótico de singular belleza. Para muestra de cuanto decimos nos enseñan el Parque Municipal y el Huerto del Cura, donde se admira la rareza de su famosa palmera de siete brazos a modo de candelabros bíblicos, y no nos dejarían abandonar la ciudad sin visitar la Alcudia, lugar en que se encontró la famosa Dama de Elche, con las excavaciones y famoso museo que allí hay.



Rokego Ifach

Por la carretera que se interna hacia el sur de España, atravesando la fabril ciudad de Crevillente y penetrando por el pueblo de Callosa del Segura en la fértil vega del Segura, hacemos un alto en Orihuela, ciudad de rancio abolengo como lo demuestran los escudos de nobleza que hay labrados en las fachadas de muchos de sus edificios. Es visita obligada a la Catedral, de estilo gótico, al Palacio y al Seminario Diocesano, de magnífica perspectiva a la huerta del Segura, y ya al final, un conocedor de la villa nos introduce en la dulcería para degustar sus famosos pasteles. Orihuela deja en nuestro espíritu un regusto melancólico por la severidad de sus edificios, a la vez que la alegría del verde de sus huertas que han inundado nuestras pupilas. Regresamos a Alicante a través de las acequias que riegan toda su huerta, por San Miguel de Salinas, parándonos un momento en Torrevieja para extasiarnos ante sus enormes Salinas, que abastecen de sal

a medio mundo y donde bien pronto resonarán las voces marineras entonando las habaneras que de aquí salieron y aquí tuvieron su cuna. Aún nos dará tiempo para bañarnos en la gran playa de Guardamar y de merendar en sus pinares al borde del mar, contemplando después su criadero de langostinos, envidia de los paladares más delicados.

Las salinas marineras nos han saturado del aroma del mar y hoy vamos a ascender a las altas montañas de la provincia, así como a los abruptos picachos. A hora temprana y tras cruzar la huerta alicantina y detenernos a orar en el Santuario de la Santa Faz y en los lindos pueblos de San Juan y Mucha Miel, llegamos a Jijona, donde lamentamos que por ser verano no estén abiertas al público las fábricas de turrón, famosas en toda España, para visitarlas. Escalamos con dificultad el puerto de la Carrasqueta por su lado Norte, a más de mil metros de altura, nos adelantamos en un paraje bravío que se hunde en anfractuosidades de bellos barrancos; Alcoy se ofrece a nuestra vista rodeado de montañas, des-

tacando la Sierra de Mariola, y entramos en la ciudad. Ciudad laboriosa e industrial, donde por doquier se ven fábricas textiles y de papel. A un alcaño que nos acompaña le pedimos que nos cuente las fiestas de "Moros y Cristianos" que se celebran en abril, y lo hace con tal verismo que nos parece ver a los paseantes provistos de sus arcabuces y ataviados con sus antiguas vestiduras de guerreros. Visitamos el Museo Municipal y para comer, nos alejamos un poco hasta la Font-Rocha, en la ladera del carrascal, paraje de singular belleza, donde visitamos la ermita para orar ante la Virgen de los Lirios. Deseamos visitar, pues nos han hablado de ella, la caverna de los Finestres y el pueblo de Muro, para entrar después a los pinares de Penáguilas y el palacio de los Marqueses de Malferit y el pintoresco paraje de los Saltos. Desciende la carretera hacia la costa para enlazar con la general de Villajoyosa, pintoresco pueblo marinero, desde donde se regresa a Alicante por la playa de San Juan, llena aún a estas horas de la tarde por los bañistas que desean aprovechar los últimos rayos del sol o tal vez los primeros de la luna para zambullirse en las siempre cálidas y tranquilas aguas.

Hemos de volver a nuestro trabajo cotidiano, mas, ¿quien abandona Alicante sin haber pasado por Benidorm?

Por una carretera a través de panoramas de ensueño junto al mar, llegamos a Villajoyosa, que ya visitamos ayer a nuestro regreso, pero que hoy vemos más detenidamente, pues deseamos visitar sus famosas fábricas de chocolate y su industria pesquera. Estamos en Benidorm, centro veraniego de primer orden con sus maravillosas playas y su delicioso cosmopolitismo que le han granjeado las preferencias de toda España y del extranjero, lugar inigualable para las vacaciones estivales en las más apacibles aguas mediterráneas. Sus grandes edificios, la mayor parte dedicados a hoteles y que pueden considerarse como los mejores de Europa, sus salas de fiestas y sus numerosas atracciones, hacen de Benidorm un lugar ideal. Para que no falte nada al paisaje, tiene hasta su antiguo Castillo, desde cuya altura se denomina todo el pueblo y se aprecia el maravilloso espectáculo del mar en una puesta de sol. Pero hemos de seguir hasta Calpe, en cuyo litoral se encuentra el



Pregejo Sankta María

ESPERANTISTA RENKONTIĜO ALICANTE-VALENCIA

Pasintan dekkvaran de Marto, la valenciaj esperantistoj vizitis la alikantajn, prepare al la proksima kongreso, efektivigota venontan Julion.

Tiucele, per komforta buso, ni iris al Alicante tra Játiva, Alcoy kaj Jijona. La trairedo estis tre agrabla, kaj, post la matenmanĝo en Alcoy ni alvenis al la krutaĵo Carrasqueta —kelkloke neĝkovrita— kie junuloj —kaj ne tiaj— profitis la mallongan halton por fieri batali per neĝbulegoj, kio okazigis ĝojon kaj ridegojn. Oni ĝuis la belegajn alikantojn panoramojn kaj, post agrabla busa kunestado ni povis konstati la surprizan aliformiĝon de Alicante kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, dank' al la magia povo de la turismaj entreprenoj kaj al la altiro de la naturo kaj al la vicleco de la alikantanoj.

Alveninte la Sindikatan Domon —estonta kongresejo— ni estis simpatie akceptitaj de la kongresa stabo kaj, post mallonga ripozeto, komenciĝis la kunido, dum kiu oni diskutis la kongresajn aranĝojn, cele al la plej perfekta disvolvigo de la venonta evento, afero kiu motivis la viziton.

La etoso estis tre agrabla. Partoprenis la kunvenon, krom la alikantaj kaj valenciaj, samideanoj el Cullera, Villena, Callosa de Segura, kaj, eĉ internaciigis la renkontiĝon samideanoj el Antverpeno, Aŭtralio kaj du eklernantoj el Maroko.

Fininte, ĉiuj iris en apudmaran restoracion, ĉe la Albufereta, kie ni gustumis bongustan alikantan "pilafon". La gradriĉaj vinoj de la regiono babiligis ĉiujn kaj eĉ paroladetis tiujn, kiuj tion ne intencis. La kantado de "La Espero" estis promeso de pliaj entuziasmoj, okaze de la venonta kongreso.

La reveno, tra la mirinda alikanta marbordo: Benidorm, Altea, rokego de Ifach, Mascarat, kaj ceteraj belaj panoramoj, estis vera ĝuo, kiun ni esperas rehavi baldaŭ, kun la tuta kongresa esperantistaro.

Nia Grupo invitis kvar el la plej lertaj lernantoj de Prof. Felikso Navarro, kiuj gajigis nin per konstantaj esperantaj kantaĵoj, kio, iamaniere, junigis nin kaj esperigis ĉiujn pri plua daŭrigo de nia frateca spirito.

C I R A N O

famoso Peñón de Ifach, emergiendo de la antigua planicie costera, monolito inmenso, casi inaccesible, a cuyos pies se abre una atractiva playa. Por su grandiosidad su visión sorprende el ánimo del visitante que queda prendido de ella ya al atravesar el paso del Mascarat, de tremendas rocas al borde del mar y que son como las últimas manifestaciones que la montaña quiere brindar al mar de su majestuoso poder. Tras el recorrido por la estrecha garganta de Gata abandonamos la ca-

rretera general para visitar Jávea, cuya iglesia ha sido declarada Monumento Artístico Nacional, y que está emplazada en un antiguo faro. Desde allí podríamos adentrarnos por magníficas carreteras hasta las pinadas de la Granadella, muy semejantes a las calas mallorquinas, pero preferimos escalar el cabo de San Antonio y descender para visitar la Fontana, el Portichol y las Cuevas de Oro y del Organo.

MIGUEL CAZORLA

DONATIVOS PARA BOLETIN - 1971

Suma anterior		2.380 ptas.		
Francisco Pérez Callejón (Suiza)		50	Sacramento Collado (Sama de Langreo)	 46 ptas.
Eduardo Padrao (Portugal)		50		
			Total	 2.526

FERVOJISTA SEKCIO DE H. E. F.

H. E. F. A.

FERVOJISTA ESPERANTISTA KONGRESO EN MARIBOR (Jugoslavio)

Refoje, kaj nun por la 23-a fojo, kolektiĝas "nia diligenta kolegaro" al kongreso, ĉijare en la jugoslava urbo Maribor. Jam estas aliĝintaj por tiu ĉi kongreso 41 hispanaj gefervojistoj kaj familianoj, kiuj pretigas siajn valizojn por forveturi el Barcelono la 13-an de majo. Ili jam havas la kongreskarton, kiu en ĉi tiu jaro estas samtempe, la senpaga bileto valida por vojaĝi tra Jugoslavio per ĉiaj trajnoj en unua klaso kaj dum la monato majo. Tiel, la nurlando, tra kiu ni, la hispanaj fervojistoj, ne rajtas vojaĝi senpage, dum la veturado al la Kongreso, en tiu ĉi okazo ni povos traveturi ĝin tute libere. Tion ni devas danki al la membroj de la L.K.K. Ankaŭ oni devas admiri tiujn kuraĝajn homojn, kiuj preninte sur sin la aranĝadon de niaj kongresoj, dum du jaroj elpensas planojn kaj laboregas por realigi ilin. De la sukceso de tiu aranĝado precipe dependas tio, ke la novaj partoprenantoj vidu plenumitaj siajn iluziojn kaj sekve restu definitive aliĝintaj al nia esperanta movado.

Estas ĉiujare la same granda travivaĵo, revidi la karajn vizaĝojn de geamikoj el multaj landoj, kaj konatiĝi kun novaj, kiuj ĵus lernis Esperanton, kaj kiuj por la unua fojo partoprenas en kongreso. Kelkaj gelernantoj de la koresponda esperanta kurso kiun gvidas nia kara kolego Rafael Devís, kiuj certe estas la plej junaj, ĉiutage venas al mi por praktiki parolante kion ili lernis parkere per tiu eksterordinara kurso, kaj mi konstatas la taŭgecon de la kurso kaj rimarkas kiom da iluzioj enhavas la koro de la novaj kaj junaj esperantistoj. Mi imagas ilin, koro-batantaj je la proksimiĝo al la kongresa akceptejo. Ili spertos ke ĉar la koro batadas tiel rapide estas ne eble elparoli ian vorton. Poste ili revenos al sia normala stato kaj mem konstatos ke tio kion ili jam lernis estas sufiĉa por interkompreniĝi kun alilandaj esperantistoj. Tiam ili komprenos ke Esperanto estas mirinda kreaĵo de ĉi tiu mondo kaj neniam plu ili apartigos ĝin de sia vivo.

JOSE CEREZO PEREZ

JUBILEA EKSPOZICIO DE LA INFANA ARTO

Gdansk - Pollando

Ni informas vin, ke Rondo de Junaj Esperantistoj de Stata Infandomo aranĝas X-an kaj Jubilean ekspozicion de la infana arto titolitan

"La Mondo, kiun amas infanoj"

Sendu: infandeseĝnaĵojn pri libervola temo kaj salutpoŝtkartojn. Ĉiu ricevos respondon. Atendas vin multaj premioj, —pupoj en nacikostumoj, albumoj, poŝtkartoj—.

Sendu vian kontribuon ĝis 15-an de majo de la kuranta jaro. La ekspozicio estos solene malfermita la 1-an de junio 1971 en la Internacia Tago de la Infanoj.

Ĝis nun tiujn ekspoziciojn vizitis 111.090 personoj.

Estu ambasadoro de vialanda kulturo kaj amiko de Pollando sendante ekspoziciajn aerpoŝte je la adreso de: Rondo de Junaj Esperantistoj de Stata Infandomo, Gdansk-Orunia, str. Brzegi 55, Pollando.

Jam estas tempo, ke mi turnigu al la hispanaj esperantistaj fervojistoj, kiuj eklernis aŭ eklernas Esperanton, sed ne ellernas ĝin ĉar mankas al ili la sufiĉa konstanteco, kiu estas necesa por sukcesi. Vere en nia lando, estas granda nombro da anoj en la Hispana Sekcio de Esperantistaj Fervojistoj, sed bedaŭrinde estas malmultaj anoj povantaj paroli korekte en Esperanto. Oni propagandas multe pri Esperanto.

Tamen estas dece oferiĝi iomete pli; ĉiu kapabla fervojisto esperantisto dum siaj liberaj horoj faru esperantajn kursojn aŭ prelegu pri Esperanto, ĉie kie li troviĝas kaj tranoktas pro la laboro.

Nu, tiu, kiu skribas ĉi tiujn liniojn, dum sia juneco, estante lokomotivkondukisto deĵoris sur la fervojo Barcelona-Portbou. Ĉiujauĉe li tranoktis en la urbeto Figueras. Vespermanĝinte, anstataŭ iri dormi aŭ en kafejon por kartludi, li preferis iri privatan domon kie jam oni atendis lin, por ke li instruu Esperanton al 7 personoj. Tiam li loĝis en Gerona; profitante tion, li kondukis Esperanton en la Fervojistan Ateneon en kiu li grupigis ĉiujn geesperantistojn de Gerona eĉ la katedran profesoron de la Seminario, pastro Casanovas. Bedaŭrinde venis nia enlanda milito, ĉio mortis koncerne Esperanton.

Tiam mi estis vaporlokomotivisto kies laboro estis pli peniga ol tiu de la nunaj elektraj lokomotivoj, kies konduktistoj ne devas iri unu horon antaŭe por prepari la lokomotivon kaj lasi ĝin unu horon post sia deĵoro por plenigi la tendron je karbo; la tiamaĵ lokomotivistoj malpurigis pro grasajo ĉar ofte ili estis devigataj rampi sub la lokomotivon por revizii la internan meĥanisman. Ankaŭ okazis, ke la lokomotivisto notis en la riparlibro la riparotaĵon, sed kvazaŭ notinte nenion li estis devigita fari ĝin per siaj propraj rimedoj. Do mi mem faris la riparojn negravajn kaj ankoraŭ mi havis tempon dediĉeblan al Esperanto.

Nun mi estas emerito ekde la jaro 1952^a; de tiam mi senĉese instruas Esperanton, kurson post kurso ĉie kie mi troviĝas. Ne gravas mia maljuneco, kontraŭe, kiam mi estas antaŭ miaj gelernantoj mia koro estas pli forta kaj juna en tiuj momentoj ĉar mi troviĝas en Esperantujo kie estas nia plej bona, fratisma idealo por la homaro.

Mi devas ankaŭ rimarkigi, ke estas iuj fervojistoj kiuj aniĝis al nia esperanta sekcio nur por povi ĉeesti niajn internaciajn kongresojn okazantajn ĉiujare en malsama lando. Kio okazas al ili? Kiam oni alparolas ilin, ili respondas: mi estas nova lernanto, aŭ nenion ili diras.

Mi skribis supre mian opinion pri la stato, en nia lando, de la esperanta movado kiu nun dormas kaj ne iras antaŭen. Ni, fervojistoj havas pli da avantaĝoj ol la ceteraj esperantistoj. Ĉar ni deĵoras for de nia loĝurbo, kaj devas tranokti aliloke, mi konsilas al vi, kapabluloj, ke vi imitu min instruante Esperanton kaj prelegante pri Esperanto.

Do, karaj samideanoj kaj kolegoj, imitu min!

H.E.F.-ano 278

JAIME MIRO

Madrid

Pri la aserto de Sro. Miró rilate al la stato de la Esperanto-movado en nia lando, li eraras, sendube, ĉar en la rondoj kiujn li frekventas la Esperanto-movado —kiel li diras— dormas; sed, en la resto de Hispanujo la Esperanto-movado iras ĉiam antaŭen; tion pravas la informoj kiujn mi ricevas de diversaj urboj.

R E D.

KIAL BLANKAS LA PERLOJ?

(Malnova orienta rakonto)

Aŭdu, mia kara nepeto, kion Fu-Can "la saĝulo" rakontadis antaŭ du mil okcent jaroj...

Kiam ekestis la homaro neniu homo kuraĝis eniri en la maran akvon: Nur post tridek kvar mil jaroj, kiam princo Lu-Ten regadis la tutan Azion, la imperia konsilantaro konjektis ke same kiel ĉi tie la tero tenas la maron, povas kaj devas okazi ke alia tero tenas je kontraŭa flanko la saman maron.

Do, oni konstruis la unuan lignoŝipon: Grandan, belan, komfortan; por ke Lu-Ten mem povu per ĝi trovi la alian maran randon.

Ducent remistoj laŭtakte remadis matene, ducent vespere, ducent nokte. La granda ŝipo rapide kuradis ĉiam orienten. La maraj ondoj restis nepercepteblaj. La movo estis tute glata.

Subite Lu-Ten ordonis haltigi la ŝipon: Ĉirkaŭ ĝi centoj kaj centoj da delfenoj per klara unutona voĉo laŭte kantadis:

"Imperiestro: Haltu ĉi tie:

Sub via ŝipo kuŝas trezoro."

Lu-Ten petis al la ŝipanaro volontulon kiu nude iru sub la ŝipon preni la anoncitan trezoron.

Neniu el la ŝipanoj kuraĝis sin subakvigi ĉar tion neniu homo faris ĝis nun. Lu-Ten mem sin ĵetis portante nur malgrandan ponardon en sia dekstra mano kaj silkan saketon pendantan de lia kolo.

Sub la ŝipo, proksime de ĝia kolo, kuŝas sur blanka mola sablo longaj vicoj da grandegaj ostroj. Ĉiu ostro per malfermitaj valvoj montradis grandan perlon, kies grandeco preskaŭ egalas kolomban ovon.

Lu-Ten ŝovis sian maldekstran manon al plej proksima ostro; samtempe li malhelpis ĝian fermon pere de la ponardeto kaj eltiris la perlon. Poste li faris la saman al la dua kaj tiel same al la aliaj ĝis la saketo pleniĝis. Tiam li malmergiĝis.

Kiam vestite li sidis sur la ferdeko, ĉiuj ŝipanoj miregis: Okdek belegaj sanĝruĝaj brilantaj perloj aspektis kiel okdek fajraj sunoj.

Lu-Ten ordonis reveni al la imperiestra palaco; sed kiam la supro de la turoj kaj tegmentoj de la ĉefurbo ekvidiĝis, la ŝipanoj ricevis de Lu-Ten novan ordonon: Ni devas halti ĉi tie ĝis la matenruĝo.

Noktomeze Lu-Ten prenis la ponardon kaj la saketon, sin ĵetis senbrue sub la akvo; per la ponardo li boris grandajn truojn en ambaŭ flankoj de la ŝipo kaj rapide naĝis al la strando.

La granda ŝipo kun sia tuta ŝipanaro mergiĝis. Nur la deĵoranta ŝipisto sin savis.

La kortego multe laŭdis Lu-Ten-on pro lia miriga akiro.

Kiam la savita ŝipano venis sekrete al la loko kie troviĝas la perlohavaj ostroj, ĉi tiujn li tie ja trovis sed pro la doloro ricevita kiam la delfenoj rakontis la ŝipopereon, la perloj por ĉiam blankiĝis.

E. MAYNAR

PIO BAROJA

Pío Baroja naskiĝis en San Sebastián en 1872 kaj mortis en Madrid la 30-an de Oktobro 1956. Fariĝinte kuracisto kaj praktikinte sian profesion dum kelke da tempo, li ekloĝis en Madrid kaj sin dediĉis al literaturo.

Kvankam ago kaj aventuro konstante plenigas liajn librojn, li estis viro trankvila kaj solena, amanta malnovajn librojn kaj simplan vivon.

Baroja vojaĝis multe tra Eŭropo kaj tre akre observis kaj komentis la varian spektaklon de la vivo en plej diversaj landoj.

En liaj interesaj romanoj svarmas amaso da kuriozaj tipoj, homoj malkontentaj kaj seniluziaj, kiuj ĉiam kaptas la leganton per siaj agoj kaj malaperas poste kun tiu natureco de la realaj estaĵoj.

Pli ol 90 librojn kaj tre abundan kunlaboraĵon en hispanaj gazetoj verkis Baroja.

En lia romano "La labirinto de la Marvirinoj" ni ĝuas belegajn priskribojn de Napolo, kaj ĉiam novaj tipoj trapasas la paĝojn de la libro kaj nin ĉarmas per siaj karaktero kaj diverseco.

Jen mallonga ĉapitro de

"LA LABIRINTO DE LA MARVIRINOJ"

Onklino Eufemia

Santa kaj Don Juan havis tre simplajn gustojn kaj komencis vivi modeste. Junulino preparis la manĝon kaj Santa zorgis pri la filino kaj la hejmaj taskoj.

Kiam Odilia foriris, Galardi pensis ke Santa tro laboras, kaj ke ili devus alvenigi fidindan virinon; la avino, Simonnetta, devis sin okupi pri la manĝo de la laboristoj en la bieno kaj ne povis iri al la Domo de la Labirinto.

Parolis Don Juan al la bopatro, kaj Alfio decidis venigi iun kuzinon sian, vidvinon post "carabinieri reale", kiu loĝis en Nicotera.

Tiu virino, onklino Eufemia, estis malaltstatura, bruna, kaj havis flavecan, terkoloran vizaĝon, kun okuloj brilantaj kiel gagato, tre laborema kaj aktiva. Ŝi ĉiam vestis nigre kaj portis kiel luksaĵon broditan mantelon kaj kupraĵn juvelojn.

Komence, Galardi kaj lia edzino estis tre kontentaj pri ŝi. Li povis trankvile laboradi kaj ĝisdate teni siajn librojn. Ŝi laboris en la domo, zorgante kaj observante ĉion.

Tri aŭ kvar monatojn post la veno de onklino Eufemia, la filino malsaniĝis, restis grave malsana dum kelkaj tagoj kaj ŝia resaniĝo multe longiĝis.

Samtempe, Santa iĝis pala kaj malsanaspekta.

—Kio okazas al vi?, demandis la edzo.

—Nenio, nenio okazas, estis la respondo.

Santa iris kun la filino al la Bateria de la Sinjorinoj, kaj tie pasigis la tempon, akompanate de onklino Eufemia. Kelkfoje ŝi kantis melankolie la lulkanzonojn, kiuj lulis ŝian infanecon; ŝi rigardis la filinon kaj ŝiaj okuloj pleniĝis je larmoj.

Car la infano ne komplete resaniĝis, la patrino estis ĉiufoje pli maltrankvila kaj trista. Iam Galardi trovis ŝin ploranta.

Ili portis la infanon al la kuracisto, kiu certigis la resaniĝon, sed la patrino ŝajne dubis pri tio.

Vidinte ŝian melankolion kaj malesperon, Galardi skribis al Odilia, ke ŝi venu, se eble, al la Domo de la Labirinto por akompanadi Santan.

Ne havante ion klaran sur kio sin apogi, Don Juan tamen ne fidis al onklino Eufemia; li timis, ke ŝi influas sur Santa, timigante ŝin. Li estis ŝokita, vidante ke en la ĉambro de la filino, Santa havis ĉiam brulantajn kandelojn, branĉetojn de rosmareno kaj eĉ salerojn.

Alvenis Odilia kaj Galardi rakontis al ŝi tion, kio okazis. Ke Santa estis ĉiam malgaja kaj maltrankvila, kaj ke li suspektis pri onklino Eufemia.

Odilia rapide komprenis tion, kio estis okazanta hejme. Onklino Eufemia suferis religimanion. Ŝi estis preskaŭ freneza kaj kontagiis sian malsanon al Santa.

Multfoje onklino Eufemia sin riglis en sia eta mansardo, eĉ se la varmo estis fortega; ŝi fermis fenestrojn, bruligis du aŭ tri kandelojn, dissemis sur la planko sanktulbildojn kaj tiel pasigis horojn kaj horojn, surgenue, preĝante, ĝis ŝi svenis pro varmo kaj ekscito, kaj post la sveno, verŝajne, ŝi normaligis.

Odilia demandis lerte al onklino Eufemia. Laŭ tiu ĉi, evidentiĝis ke la "jettatura" estis faranta grandajn domaĝojn en la domo de la Labirinto.

Dum la tempo kiam la infano estis malsana, onklino Eufemia rekomendis al Santa, ke ŝi iru tri tagojn, je la mateniĝo, al iu ŝtono el tiuj limigantaj la bienon kaj tie, ornamente ĝin, ŝi petu al Dio ke Li finigu la malsanon de la infano. Car tio ne donis rezulton, onklino Eufemia certigis al Santa, ke iu vaganta maljunulino, kiu tiam aperis en la proksimeco de la bieno, estis intensiga kaŭzo de la "jettaturo". Onklino Eufemia estis preta, se la maljunulino ne estus malaperinta, ŝin ĵeti en la maron.

Santa kaj ŝia onklino venigis sorĉuracistinon el la vilaĝo kaj tiu ĉi kampara Hekato diris, ke ĉio kredigas ke oni ĵetis "jettaturon" sur la infanon kaj ke supozeble tion faris la maljuna almozulino, sed ĉar tiu estis malaperinta, la sorĉistino rekomendis ke ili serĉu proksime al la domo iun dishirtiĝintan katinon malbonaspektan, ĉar tiuj maljunaj "jettatorinoj" kutimis sin prezenti sub formo de katoj.

Santa en sia teruro, kredis ĉion. Bonŝance, la maljunulino ne plu aperis apud Punta Rosa; kontraŭe, eble io malbona estus okazinta al ŝi.

Galardi, iun tagon kiam Santa estis for, venigis onklinon Eufemian.

—Nun, tuj —li diris— vi devas forlasi tiun ĉi domon.

—Mi? Kial?

—Car vi estas freneziganta mian edzinon per tiuj stultaĵoj pri "jettaturoj".

—Ne estas stultaĵoj —respondis ŝi milde, sed samtempe firme.

Don Juan komprenis rapide, ke diskuti estus perdi terenon kaj ŝanĝante la tonon li demandis:

—Cu vi scias, kiu kaŭzas "jettaturon" al tiu ĉi domo kaj al la infano?

—Kiu?

—Vi mem!

—Mi! Pro Dio, ne...! Pro Dio...!

—Jes, vi mem. Oni devus ĵeti vin al la maro. Iru for! Iru for el tiu ĉi domo!

Onklino Eufemia forlasis la ĉambron de Galardi; ŝi iris al sia ĉambreto, kaj moviĝis bruege pli ol unu horon, plorante, laŭte parolante, kaj subite ŝi eniris la ĉambron de Don Juan kaj sin ĵetis al liaj piedoj.

—Mortigu min! —ŝi diris—. Estas vere. Mortigu min. Estas mi, kiu alportis "jettaturon" al via domo.

—Iru for, iru for!

—Jes. Mi neniam revenos.

Subite, onklino Eufemia komencis paroli elokvente kaj inspirate, ĵetante sur sin la tutan kulpon kaj alvokante sur sian kapon la ĉielan koleron kaj la inferan punon.

La mieno de tiu virino, tordita kaj palega, estis tiu de demon-posedatino.

Ŝi mem ne sciis, kion ŝi diris; ŝi troviĝis en profeta tranco.

Cimamente aperis Santa, kiu restis mirigita vidante sian onklinon surtere, kriantran malbenojn kontraŭ si mem.

—Kio okazas? —demandis Santa.

—Estu feliĉaj —kriegis la virino kun inspirita voĉo—; ke via domo estu feliĉa kaj vin akompanu la benoj de la bonuloj. Mi mortos, malaperos. Mi estas mizerulino kaj povas nur porti malfeliĉon tien, kien mi iras.

Kelkajn tagojn poste la infano resaniĝis kaj Santa komencis reesti gaja kaj bonaspekta.

—Tiu strigo amarigis vian vivon —diris Don Juan al sia edzino.

—Malfeliĉulino! Kaj tamen, ŝi estis bona.

Por eviti novan atakon de "jettaturo", Santa metis sur la dompordon unu kornon kaj branĉetojn de koralo.

—Fino—

J E S

José de Espronceda (1808-1842) naskiĝis en Almendralejo (Badajoz) kaj mortis en Madrido. Liaj vivo kaj verko montras lin kiel reprezentan tipon de la romantika epoko, kies elstara figuro li estis.

Impeto, verovo, spita fanfaronemo kaj senbrida, aroganta individuismo karakterizas la poezion de Espronceda. Tiaj ingrediencoj komponas unu el liaj plej popularaj pecoj, "Pirata kanto", kies traduko aperas ĉi-sube.

Kun la flankoj dek-kanonaj,
favor-vente, pufa-vele,
sur la maro glitas bele
tre rapida brigantin'.
Oni nomas kun ekstremo
tiun ŝipon "La Timata",
sub la nigra flag' pirata
bravas ĝi sur mara sin'.

Lumo glimas sur la maro,
vento kaŭzas krakojn tolajn,
levas etajn ondojn molajn,
ŝaŭmo blankas en lazur'.
Kaj la piratestro kantas,
dum vidiĝas de la topo
jen Azio, jen Eŭropo,
jen, antaŭe, Istanbul':

—Vi navigu, ŝipo mia,
ĉiam spite.
Nek tempesto plej rabia
nek ataka karavelo
povos turni vin de l' celo:
vi aŭdacas ja senbride.

Dudek ŝipojn
ni jam prenis,
vane ĝenis
angla flot'.
Buntaj flagoj
cent-naciaj
iĝis niaj
per la fort'.

Car mia leĝo: la forto.
Car mia kara: la ŝip'.
Mia patrujo: la maro.
Kaj la liber': mia Di'.

Blinde luktas kun kolero
stultaj reĝoj
kaŭze de plenman' da tero.
Dume mi, en spita staro,
mastras sur la vasta maro,
kie ne validas leĝoj.

Ciuj flagoj
de ĉeflandoj,
ĉiuj strandoj
de la mar'
bone scias
pri la krudo
kaj sintrudo
de ĉi man'.

Car mia leĝo: la forto...

Ce la krio: —Sip' proksima!
sceno belas:
tuj la ŝipo, mortotima,
fuĝe turnas sin panike:
ke mi regas ja unike,
kaj kapere mi kruelas.

Mi la predojn
atribuas,
distribuas
sen prefer'.
Mi retenas,
pro inklinoj,
nur virinojn
en flor-bel'.

Car mia leĝo: la forto...

Kondamnita mi je morto...!
Bela puno!
Sed, se helpas min la sorto,
zorgu mem la kondamninto,
ke mi ne pendumu lin do
de anten' de lia skuno.

Ba, la vivo!
Mian vetis,
ĝin mi ĵetis
al ĉi lud',
ribelinte
kiel brava,
for de sklava
peza jug'.

Car mia leĝo: la forto...

Jen muzikoj plej agrablaj:
akvilonoj,
ĝemoj kaj zumadoj kablaj,
maraj blekoj kaj ululoj,
sibloj de la rigo-ŝnuroj
kaj tondrado de kanonoj.

Al mi plaĉas
por ekdormo,
brua ŝtormo,
hurla mar',
kaj mi sonĝas
en trankvilo
kun la spiro
de infan'.

Car mia leĝo: la forto.
Car mia kara: la ŝip'.
Mia patrujo: la maro.
Kaj la liber': mia Di'.

Tradukis, F. de Diego

NIAJ GRUPOJ

GIJON

La Esperanto-Grupo "Jovellanos" de Ateneo Jovellanos daŭrigas sian viglan funkciadon pri kiu amplekse informis kaj informas la Radio kaj la lokaj kaj provincaj ĵurnaloj.

Sekve de tiu intensa propagando kaj serioza informado fare de la Grupo, ĉijare estis necese organizi kursojn de Esperanto en "Círculo de Idiomas" kaj en la kulturdomo "Sociedad Cultural Gijonesa", kiuj vekis grandan intereson en la urbo.

La kursoj komenciĝis la 21-an de januaro kaj la 15-an de februaro respektive, ambaŭ sub la gvidado de Sro. Santiago Mulas kiel profesoro; partoprenas ilin 30 entuziasmaj ĝejnuloj.

Laŭ informoj de la Sekretario, Sro. José Ordieres, la Grupo "Jovellanos" havas grandajn kaj ambiciajn projektojn, kiujn oni diskonigos en oportuna momento.

VALLADOLID

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Por celebri adekvate la Semajnon de Internacia Amikeco, la Esperanto-Grupo "Fido kaj Espero" de Valladolid, organizis diversajn aranĝojn la sabaton 27-an de Februaro, kiuj okazis, kun ĉeesto de pli ol 50 personoj, en ĝia sidejo.

Je la 8,15 vespere, sub prezido de Sro. Díez García, Prezidanto de la Grupo, akompanate de du estraranoj, komenciĝis la aranĝo per salutvortoj de Sro. Díez en hispana lingvo, per kiuj li klarigis la signifon de la Festo, kiun ni celebras, kaj ankaŭ, la signifon de la vorto Amikeco kaj konkludis dirante ke amikeco estas fundamenta bazo por la paco. Multaj aplaŭdoj sigelis la paroladon de nia estimata Prezidanto. Poste, nome de la invititaj Asocioj, parolis Sro. Santaolaya, estrarano de la Vegetarana Asocio, kiu montris sian ĝojon pro la celebrado de ĉi tiu festo kun la Esperanto-Societo, emfazante la komunajn punktojn kiujn havas ambaŭ asocioj. Je la fino de sia paroladeto, nia Prezidanto manpremis lin en simbolo de amikeco inter Esperanto kaj la Mondo. Sekve Sro. Gamboa y Sánchez, Vicprezidanto de la Grupo, prezentis al la multnombra ĉeestantaro, diskojn kun kanzonoj en la Internacia Lingvo. Inter ili ni aŭskultis: "Se ni havus martelon" kaj "Israela lulkanto" kantatajn de la nederlanda "Duo Espero" kaj la popularan katalunan kanton "Jen Empordá" kantatan de la floro de la Barcelona Universitato. (Tiun ĉi diskon oni gravuris okaze de la XXIV^a H.E.K.). Ankaŭ por montri al la neesperantistaj ĉeestantoj la taŭgecon de Esperanto kiel internacia interkomprenilo, ni aŭdis la voĉojn de diversnaciaj esperantistoj kiuj salutis dum la 49^a U.K. Per la kantado de la Himno "La Espero" finiĝis la unua parto. La dua konsistis el lunĉo, donaco de la Grupo al la ĉeestantaj samideanoj kaj amikoj. Tiel en amikeca etoso la Valladolid-a Grupo celebris ĉijare la Semajnon de Internacia Amikeco.

L. HERNANDEZ

ANTONIO FERRER SOLER

La 25-an de aprilo forpasis en La Laguna, en la aĝo de 61 jaroj, Sro. Antonio Ferrer Soler, malnova esperantisto, konstanta membro de Hispana Esperanto-Federacio.

Li estis kunfondinto de la Grupo Laborista de Valencio, kaj en La Laguna ĉiam vigle partoprenis la agadon de la Esperantista Societo de Tenerifo, kies membro li estis ekde ĝia fondiĝo.

Li pace ripozu!!!

Al lia vidvino, S-ino Consuelo Hervás Navarro, ankaŭ esperantistino, kaj al liaj gefiloj kaj ceteraj gefamilianoj ni esprimas nian sinceran kondolencon. Aparte ni tion faras al lia filo Sro. Antonio Ferrer Hervás, nuna Prezidanto de la Esperantista Societo de Tenerifo kaj Sekretario de la Loka Kongresa Komitato de la XXIX Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en La Laguna.

Eŭgeno Aleksejeviĉ Bokarev

La 11-an de marto forpasis en Moskvo nia elstara samideano kaj kara amiko prof. Dro. Eŭgeno Aleksejeviĉ Bokarev, doktoro de filologiaj sciencoj, universitata profesoro kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Lia forpaso lasas grandan malplenon inter la sovetaĵ esperantistoj, kies landa prezidanto li estis, kaj ankaŭ en la koro de liaj amikoj.

Al niaj sovetaĵ samideanoj nian plej sinceran kondolencon. La memoro de Prof. Bokarev restos ĉiam inter la esperantistoj, kiuj lin konis.

PACAN RIPOZON AL LI!!!

Manuel Palet Beltrán

La 19-an de marto mortis en Sabadell Sro. Manuel Palet Beltrán kiam li aĝis 67 jarojn.

Nia forpasinta samideano estis aktiva propagandisto de Esperanto, lingvo kaj ideo.

LI PACE RIPOZU!!!

Nian plej sinceran kondolencon al liaj familianoj kaj al la Centro de Esperanto Sabadell, kiu denove perdis unu el siaj membroj.

Fernando Oyarzábal Tejada

La 18-an de marto subite mortis en Bilbao nia karmemora kaj ankoraŭ juna samideano Fernando Oyarzábal Tejada, komerca agento, en la aĝo de 45 jaroj.

Agema kaj laborkapabla esperantisto, li tre kontribuis al la organizo de la du lastaj naciaj kongresoj okazintaj en Bilbao.

Lia forpaso forte ŝokis kaj kortuŝis la esperantistojn de Bilbao, kiuj pie ĉeestis la funebrajn ceremoniojn.

LI RIPOZU EN PACO!!!

Angel Bolaños Martínez

Ankoraŭ kun la doloriga impresoj de la morto de nia samideano Oyarzábal, denove nin draste frapis alia amara novaĵo: la 31-an de marto nia ŝatata amiko Angel Bolaños Martínez, forpasis ankaŭ subite, en la aĝo 55-jaroj. En la nokto de sia forpaso, li estis en la Esperanto-Grupo de Bilbao ĝis la 10^a aŭ 10,30 h., proksimume, kun siaj edzino kaj filino. Kelkajn horojn poste li pereis, pro infarkto de la miokardio.

Fidela, bona amiko kaj samideano, tre sperta fotografisto, Kasisto dum pluraj jaroj, de la Esperanto-Grupo de Bilbao, Bolaños lasis post si, ne nur grandan vakuon en la propra familio sed ankaŭ en la Grupo.

PACAN RIPOZON AL LI!!!


La ĵus ricevitaĵ informoj de Bilbao, kiujn mi aperigas en ĉi tiu paĝo de BOLETIN, profunde kortuŝis nin, ĉar ni bone rememoras la sindonon kaj simpatian de niaj forpasintaĵ samideanoj, Sro. Oyarzábal kaj Bolaños.

Por ties familioj kaj por la Grupo Esperantista de Bilbao, kiu perdis du el siaj plej aktivaj membroj, nian sinceran kondolencon.

RED.

E
X
T
R
E
M
A
D
U
R
A

Monaĥejo
Guadalupe



Oni diras ke la ekstrema-
rano estas plej hispana his-
pano.

Extremadura (Ekstremaĉuro), hispa-
na regiono situanta en la sud-okcidento
de la lando limas kun Portugalujo, kaj
konsistas el du provincoj, la plej gran-
daj de Hispanujo. En la pasinteco ĝi
apartenis al la Lusitania, roma provin-
co kun Mérida kiel ĉefurbo; en la ara-
ba epoko ĝi fariĝis potenca regno
maŭra, ĉefurbo Badajoz; en la XIV^a
jarcento ĝi integriĝis al Hispanujo.

Ĝi donis al la historio homojn fame
konatajn en la tuta mondo: Alonso de
Monroy, D. García de Paredes, Hernán
Cortés, Francisco Pizarro, F. de Orellana,
San Pedro de Alcántara, la filozofo
Donoso Cortés, Espronceda, Zurbarán,
Godoy —Princo de la Paco—...

Geografie la teritorio dividiĝas en du
provincojn: Cáceres kaj Badajoz, la
Alta kaj la Malalta Ekstremaĉuro res-
pektive. Kvankam tiu divido estas natu-
ra, la vasta teritorio ekstremaĉura
konsistas el diversaj regionoj de mal-
nova kaj ne malpli natura origino.

La norda parto estas regiono frukto-
dona, riĉa kaj tre bela, kun klimato
subtropika. En ĝi staras la fama Mona-
ĥejo de Yuste.

En la Malalta Ekstremaĉuro aŭ pro-
vinco Badajoz troviĝas La Serena kaj
Tierra de Barros, regionoj ĝemelaj,
eksterordinare fruktodonaj, kun urboj
riĉaj kaj dense loĝataj, kie ekzistas an-
koraŭ la mirinda kampara paco, tiel
bele kantita de Gabriel y Galán kaj
Chamizo, popularaj poetoj de la vivo
humila kaj simpla. Ambaŭ regionojn,
tre malproksimajn unu de la alia, disi-
gas riĉaj kaj vastaj paŝtejoj kiuj kon-
sistigas provizejon neelĉerpeblan de
ĝiaj multnombraj gregoj kaj de la
transmigrantaj brutaroj de Castilla.

Se ni dezirus difini la karakteron de
la ekstremaĉuranoj, ni elektus tiujn du
vortojn: sincero kaj noblo; en sinteno
serioze digna kaj vireca.

La vojaĝanto povas ĝui en la urbe-
toj kaj vilaĝoj el Ekstremaĉuro gran-
dan riĉon de folkloraj manifestiĝoj.
Montehermoso (Cáceres), estas la sola
vilaĝo en kiu oni uzas ankoraŭ la ti-
pan regionan kostumon. La virina pa-

rad-kostumo de Montehermoso, sendube la plej riĉa de la regiono, restas kiel simbolo de la tipaj kostumoj el Ekstremaduro.

La popola ekstremadura lingvo tre similas al tiu de la Alta Andaluzio.

Pro diversaj kaŭzoj la nekalkuleblajn artajn belajojn de la regiono oni ne ĝuste taksis en niaj art-historioj, tial ilin oni ne sufiĉe konas.

Ekzistas en la regiono diversaj unuarangaj artaĵoj, kiuj meritas apartan viziton: la Monaĥejo de Guadalupe; la tutaĵo de la gotika urbo Cáceres; la romaj relikvoj de la urbo Mérida, la mezepoka arkitekturo de Trujillo, la ponto de Alcántara, ktp.

Kaj, kiu ne aŭdis paroli pri Yuste? La plej bela heroaĵo de tiu heroa Reĝo, Carlos la I^a de Hispanujo, Imperiestro de Germanujo, estis lia abdiko en Bruselo, kaj, kiel komplemento de tiu ago, lia ermita retiriĝo en Yuste. La Monaĥejo de Yuste formis parton de la Monaĥejo de Guadalupe en la XV^a jarcento. La Grafoj de Ŭropesa pligrandigis la konstruaĵon en la XVI^a jarcento, kaj la Imperiestro Carlos elektis ĝin kiel retiron post sia abdiko. Li alvenis tien la 3-an de februaro 1557, akompanata de malmultaj personoj, kaj tie li restis ĝis la tago de sia morto, la 21-an de septembro 1558. Li vivis en la Monaĥejo tre aŭstere, sed ne tute aparta de la aferoj de l' mondo; li interkorespondis kun sia filo, jam Reĝo, Felipe la II^a.

Tiu fakto havigis lokon al la Monaĥejo en la Universala Historio.

Eble, plej elstare karakterizas tiun regionon ĝiaj sennombraj kasteloj: Medellín, Magacela, Benquerencia, Almorchón, Castelnovo, Orellana, Puebla de Alcocer, Herrera del Duque, Capilla kaj Zalamea. Calderón de la Barca eterniĝis tiun lastan vilaĝon per sia fama dramo "La Urbestro de Zalamea", en

kiu li majstre portretis la firman karakteron de la ekstremadura vilaĝano. Tiun majstroverkon de la hispana literaturo esperantigis en 1925, E. Le-grand.


Kiu ŝatas naturon en Ekstremaduro trovas apud altaj pintoj kiel Calvitero (2.401 m.) vastajn altebenaĵojn.

La plej grava riĉo de la regiono estis —kaj estas ankoraŭ— la brutaro. Badajoz okupas la unuan lokon en Hispanujo, rilate al ŝafaj, porkaj kaj mullaj gregoj, kaj Cáceres la duan rilate al ŝafaj, la trian rilate al kapraj kaj la duan rilate al abelbredado. Entute, la du provincoj rangas unuaj rilate al la nombro da bestoj kaj la pezo de la brutaro. Pri la agrikulturo, krom la paŝtejoj, kiuj nutras ne nur la propran brutaron, sed ankaŭ tiun de la altebenaĵoj de Hispanujo, de antaŭ dudeko da jaroj, dank' al la "Plan Badajoz" kaj "Plan Cáceres", kiuj baziĝas, la unua sur la teknika ekspluato de la granda rivero Guadiana, kaj la dua sur la taŭgigo de kvar malgrandaj riveroj, kiuj alfluas al Tajo, ebligis la irigacio de grandaj zonoj, kio transformis la regionon en unu el la plej riĉaj.

Kompreneble la industrio ne povas manki en tiu teritorio, kiun multaj hispanoj konsideris nur historia relikvo, sed kiu vivas kaj kreskas laŭ la ritmo de la nuntempa epoko. Tiel Badajoz, Mérida, Don Benito, Plasencia, ktp., vidas la impresan disvolviĝon de vastaj ĉirkaŭurboj kaj de modernaj industriaj kompleksoj, kie loĝas kaj laboras grandaj amasoj da laboristoj.

Multe ni povus paroli ankoraŭ pri tiu regiono, kie kuniĝas historio kaj arto kun rapida progreso. Sed, por bone koni Ekstremaduron, oni devas viziti ĝin. La nobla karaktero de ĝiaj loĝantoj kaptos por ĉiam vian koron.

INES GASTON



KRUKO KAJ BANIKO EL BERVALO, de Louis Beaucaire. Eldonis TK, Kopenhago, 1970. 144 paĝoj, formato 21 × 15 cm, broŝurita kaj ilustrita. Prezo: 320 ptoj.

Certe ĉi tiu libro ne konvenas al pruduoj nek, kompreneble, al junaj geknaboj. Temas pri riĉa fasko de historietoj kaj ŝercoj, en kiuj rolas ĉefe la seksa vivo traktata en gaja kaj senĝena humuro. La aŭtoro montriĝas posedanto de bela, propra sprito, ĉar apud rakontoj tre konataj, jam de internacia famo, li prezentas sian personan rikolton, kiu brilas en la tiel nomataj "bervalaĵoj", en la historiet-titoloj aludantaj al Esperantaj verkoj aŭ proverboj (kaj per kiuj la konanto de nia literaturo ricevas duoblan plaĉon) kaj en kelkaj ŝercoj sencohavaj nur en nia lingvo, ĉar ili baziĝas sur vortoludoj ekskluzivaj al Esperanto.

Louis Beaucaire manipulas nian lingvon ĉiam senerare kaj kun eksterordinara esprimo, kaj same kiel "Sekretaj sonetoj" de Peter Paneter farigis klasikajo en nia erotika beletro, "Kruko kaj Baniko el Bervalo" okupos privilegian lokon en sia speciala fako. De la aŭtoro ni atendas jam novajn montrojn de lia brila talento. Lian libron ni senhezite rekomendas al la legantoj, al kiuj plaĉas la spico, la salo, la pipro kaj la papriko en certaj aspektoj de la humura vivo.

F. de Diego

LA TRADICIA VJETNAMIO. Eldonis Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1970. 172 paĝoj, formato 19 × 13 cm., broŝurita. Prezo: ne indikita.

Niaj senlacaj samideanoj de Hanojo regas nin ĉi-foje per verko, kiu prezentas historian perspektivon de Vjetnamio, de la ŝtonepoko ĝis la 18^a jarcento, kun mencio de la kultura evoluo de la 17^a ĝis la komenciĝo de la 19^a jarcento. Kvankam oni interpretas la historion de la vidpunkto de la revolucia dialektiko, kio al kelkaj ŝajnas procedo tro partia kaj subjektiva, tamen la verko havas nedubeblan intereseon, ĉar ĝi rivelas la fascinajn historion de popolo apenaŭ konata en nia parto de la mondo. La lingvo estas ĝenerale bona, kaj ne valoras menciis sporadajn makuletojn.

F. de Diego

KLERECO POR HODIAŬ KAJ MORGAŬ. Eldonis "Verlag Zeit im Bild", Dresden. 68 paĝoj, formato 20 × 14 cm., broŝurita. Prezo: ne indikita.

La broŝuro temas pri la kleriga sistemo socialisma funkcia en la Germana Demokrata Respubliko. Sendube ĝi havas por niaj pedagogoj aplikeblajn sugestojn en la kampo de la edukado. Aparte interesa estas la rubriko 'Kunlaboro de lernejo kaj gepatroj'. Leginda kaj pensiga broŝuro kun pozitivaj ideoj rilate al kelkaj problemoj, kiuj tutmonde plagas la klerigan sistemon.

F. de Diego

NI KOMEDIETAS... de Zora Heide. Eldonis 'Dansk Esperanto-Forlag' Aabyhoj, 1971. 32 paĝoj, formato 20,5 × 14,5 cm., broŝurita. Prezo: 40 ptoj.

La libreto konsistas el 8 skeĉoj verkita por esti ludataj en kunvenoj kaj amuzaj aranĝoj. Eble ne ĉiuj skeĉoj konvenas al ĉiuj specoj de publiko, ĉar kelkaj el ili, ĉefe "Psikoanalizo" certe ŝokos iom tro iujn personojn pro sia ne multe edifa enhavo. Tiaj farsoj ŝajnas jam eksmodaj, sed eble ie en la vasta mondo ili aperas ankoraŭ freŝaj kaj originalaj. La lingvo estas apenaŭ kritikinda.

F. de Diego

UKRAINA SOVETA SOCIALISMA RESPUBLIKO. Eldonis 'Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando'. 25 paĝoj, formato 20 × 15 cm., broŝurita. Prezo: ne indikita.

Informa libreto pri Ukrainio kun emfazo pri ties ekonomia, socia kaj kultura evoluo montrita per komparaj statistikaj tabeloj.

TRA SOVETA UKRAINIO. Presbulteno de 'Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando'. Numeroj 4-5, julio-oktobro 1970.

Revuo kun diversa kaj interesa enhavo pri temoj kaj homoj de Ukrainio, kaj ĉi-foje kun speciala parto dediĉita al la poetino Lesja Ukrainka.

Ĉarto de Unuigintaj Nacioj kaj Statuto de la Internacia Kortumo. La prezo de ĉi tiu verko aperinta en **BOLETIN** estas erara, ĝia prezo estas 54 pesetoj.

Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto de D-ro L. L. Zamenhof, 17^a eldono 1954, Foto-reproso 1969. The Esperanto Publishing Company, Rickmansworth, Anglujo. 442 paĝoj, tolbindita, Prezo: 252 pesetoj.

Iom prokraste ni ricevis ekzempleron de foto-reproso de la 17^a eldono de Fundamenta Krestomatio, unu el la plej gravaj verkoj de Esperanto.

Kompreneble, la libron ni ne intencas recenzi, sed mi deziras atentigi al la novaj kaj malnovaj esperantistoj pri tiu nova eldono de Fundamenta Krestomatio: al la novaj ĉar, eble, ili ne konas la verkon kaj sekve, ne konscias pri la graveco de ĝia legado kaj studado; al la malnovaj, ĉar eble, por ili estas interesa la akiro de la verko en belaspekta eldono.

Steiermark - Graz. Jen du plurkoloraj turismaj informiloj faldformataj kaj tre bele prezentitaj, pri tiuj interesa kaj varia lando Stirio (Aŭstrujo) kaj ĝia ĉefurbo Graz. La unua estas eldonita en ses lingvoj kun Esperantlingva aldono kaj la dua en la germana kaj en Esperanto.

Eldono kaj informoj ĉe la Landa Fremdultrafika Oficejo (Landes-Fremdenverkehrs-Amt) A-8010 Graz, Herrngasse 16. Informojn donas ankaŭ la Esperanto-Societo Unueco, 8020 Graz, Eggenberggürtel 32. E-gvidisto estas je via dispono.

Du faldfolioj. La mondfama, itala entrepreno aŭtomobila Fiat, kiu ordinare uzas ankaŭ Esperanton por la diskonigo de siaj veturiloj, ĵus eldonis du belajn, kolore presitajn faldfoliojn. Ili reklamas, per abundo de bildoj kaj teknikaj detaloj, la Fiat-modelojn "124-Special" kaj "124-Special T".

Ne nur pro la informoj mem, sed ankaŭ pro la uzo, ĉiam ĝusta, de multaj terminoj aŭtomobilaj en Esperanto, la faldfolioj havas grandan intereson por ĉiuj seriozaj Esperantistoj. Oni petu ilin al: FIAT. Propaganda fako. Fiat. Torino. Italujo.

LA GROTOJ de Centra Slovakio, Ĉeĥoslovakujo. — Informa faldfolio plurkolora pri la grotoj de Centra Slovakio. Informas pri la Grotoj: Vojaĝoficejoj Cedok.

METODIKO DE LA ESPERANTO INSTRUADO. — Rudolf Rakuša, Gvidlibro por Instruantoj de la Lingvo Internacia. 189 paĝoj. Prezo ne indikita. broŝurita. Eldonis: Mladinska Knjiga Ljubljana. 1970.

Du ekzempleroj de la koncerna verko rajtas recenzon; unu, mencion.

Ciujn verkojn recenzitajn en **BOLETIN**, vi povos aĉeti ĉe la Libroservo de H.E.F. I. Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. Zaragoza.

NOVAJ KURSOJ DE ESPERANTO

Sevilla

Nia samideano Sro. Felipe González del Pino, el Sevilla, post diversaj kontaktoj kun la Provinca Delegito de la Ministerio de Edukado kaj Scienco, kaj kun la Direktoro de Instituto de Enseñanza Media "San Isidoro", atingis permeson por okazigi kurson de Esperanto en tiu Instituto.

Post taŭga propagando kaj post aperigo de anonco pri la kurso en ĉiuj ĵurnaloj de la urbo, la kurso komenciĝis la 1-an de marto sub la gvidado de Sro. González del Pino kiel profesoro. Partoprenas ĝin 40 kursanoj, inter ili portugala samideano, loĝanta en Sevilla de antaŭ kelkaj monatoj, kiu de antaŭ multaj jaroj ne havis kontakton kun esperantistoj kaj nun profitis la okazon por denove aktivi en la movado kaj rememori la jam iomete forgesitan esperanton. Ankaŭ partoprenas la kurson tri usonanoj, la Direktoro de Usonaj Lernejoj, lia edzino kaj lia Sekretariino. Do, la kurso estas internacia.

ESPERANTO RENASKIĜAS EN VIC

Je la fino de pasinta februaro en la urbo Vic (Barcelona) kaj ĉe la Publika Biblioteko de "Caixa de Pensions" okazis lumbilda prelego pri **VEJAGO TRA EŬROPO SEN LANDLIMOJ**. Preleganto estis samideano Ramón Molera, Ĉefdelegito de UEA en Hispanujo. La multnombra publiko sekvis entute la viziton al multaj eŭropaj landoj kaj ĉefe interesiĝis pri la rolo de la internacia lingvo en la moderna vivo, faktoj dokumente prezentitaj je la fino de la prelego.

Je la sama loko oni jam malfermis la aliĝadon al la venonta kurso kiu kun pli ol 25 gelnantoj okazas ĉiuvendrede ĉe la "Jove Cambra" —str. San Fiel, 11—, organizo kiu akceptis en sia sidejo la novan vigan Esperanto-grupon. Oni planis **LETERVESPERON** je la venonta monato junio kaj ĉiuj kuraĝigaj korespondadoj estos bonvenaj.

Debido a la semejanza de título en dos obras de AZORIN, lo que puede ocasionar confusión, publicamos a continuación el capítulo que ha de ser traducido para el concurso.

LOS PUEBLOS

(Ensayos sobre la vida provinciana)

Azorín

LA FIESTA

He aquí cómo el poeta vuelve viejo a su patria

Don Joaquín se detiene un momento en el umbral; le acompaña un criado.

—¿Cómo está usted, don Joaquín? —le dice doña Juana—.

—¿Qué tal le va a usted, don Joaquín? —le dice don Antonio—. —Sabíamos que había llegado usted esta mañana; pero ¡cómo habíamos de sospechar que viniese usted por aquí esta tarde!

—¿Y ustedes?... ¿Y ustedes?... ¿Cómo se encuentran? ¡Caramba! La verdad es que hace tiempo que no nos veíamos. Y ahora tampoco nos vemos... Digo, yo soy el que no puedo ver a ustedes.

Doña Juana ha acercado un sillón.

—Siéntese usted aquí, don Joaquín.

Don Antonio coge de la mano a don Joaquín y lo lleva hasta el sillón. Don Joaquín se sienta con cuidado, lentamente. La puerta está abierta de par en par; aparece el ancho zaguán limpio, embaldosado con losetas blancas y negras; por la calle discurre un hormiguero rumoroso de gente.

—¿Está usted parando en su casa, don Joaquín? —pregunta doña Juana—.

—Estoy en casa de mi hermana —dice don Joaquín—. Mi casa estará hecha un corral; todos los muebles estarán llenos de cucarachas, de arañas y de polvo. Hace veinte años que no se ha abierto... desde que yo me fuí. Virginia me escribe en las cartas que la limpia dos o tres veces al año; pero yo no lo creo... Además, no quiero entrar en ella; yo no puedo ver nada, y me daría tristeza el tocar, para reconocerlos, aquellos muebles que vieron mi juventud...

—De modo —dice don Antonio— que usted se ha acordado este año del pueblo y ha querido venir a ver la fiesta.

—Sí —contesta don Joaquín—, sí; he querido venir este año. Me he dicho: "Puesto que ya quizá no pueda tener otra ocasión, aprovecharemos ésta, que tal vez será la última". Y he venido a ver, es decir, a sentir el pueblo, a saludar a los buenos amigos, como ustedes...

Se oye un lejano campaneo estrepitoso, jovial; estallan cohetes en el aire; el cielo se va poniendo de un azul pálido.

Doña Juana se levanta de pronto.

—Pero usted, don Joaquín, ¿no conocerá a Lola, ni a Clara, ni a Conchita, la que apadrinó usted en Madrid?

Doña Juana se acerca al hueco de la escalera, y grita:

—¡Clara, Lola, Concha!... ¡Bajad, que está aquí don Joaquín!

—Estarán en el balcón —dice don Antonio—.

Y se asoma a la calle y exclama, mirando hacia arriba:

—Bajad, que está aquí don Joaquín.

Se oye en el techo ruido precipitado de tacones finos y menuditos; luego, en la escalera, un rumor de faldas, de voces, de risas alocadas. Y, de repente, como una aparición mágica, las tres se hallan en la entrada, serias, derechas, mirando a don Joaquín con sus grandes ojos azules, grises, negros.

—¿Vosotras no conocéis a don Joaquín? —les dice don Antonio—,

Las tres callan.

—Clara, ¿tú no te acuerdas que cuando eras pequeñita él te llevaba al jardín?

—No, no —dice don Joaquín sonriendo—; ella no se acordará. ¡Hace ya tantos años!

—Tú, Lola, sí que no te acuerdas —le dice don Antonio a Lola—; tú tenías dos años cuando él se marchó.

—Yo sí que me acuerdo de ella —dice don Joaquín—; Lola tenía los ojos azules. ¿Es verdad que los tenía azules?

Lola se pone un poco roja.

—Sí, don Joaquín, los tiene azules —afirma doña Juana—.

—¿Y Conchita? —preguntó don Joaquín—. ¿Esta aquí?

—Aquí está, delante de usted —contesta don Antonio—.
—Conchita —dice don Joaquín—, yo soy el que te tuvo en la pila del bautismo hace quince años.

—Sí, don Joaquín —dice Conchita—; ya sé que es usted mi padrino.
—Ella me pregunta muchas veces por usted —dice doña Juana—.
—Yo no puedo verte, Conchita —dice don Joaquín—. ¿Cómo eres? ¿Cómo es Conchita?

—Es alta y delgada —contesta doña Juana—.
—¿Cómo tiene el pelo?
—El pelo es rubio y largo.
Las mejillas de Conchita se encienden con vivos carmines.
—¿Y los ojos? ¿De qué color son los ojos?
—Los ojos son entre grises y verdes; unas veces parecen grises y otras verdes.

—¿Y la boca?
—La boca es pequeña y con los labios rojos.
—Conchita —exclama don Joaquín—, eres una linda muchacha, y yo estoy contento por haberte tenido en mis brazos cuando contabas ocho días... Y vosotras también lo sois, Lola y Clara; pero yo no puedo veros a ninguna...

Una criada entra llevando en las manos una ancha bandeja llena de flores.
—Ya están aquí las flores —dice Lola—.
—¿Han traído flores? —pregunta don Joaquín—.
—Son las flores que hemos de tirar cuando pase la Virgen —contesta Clara—.
—¿Qué flores son? —torna a preguntar don Joaquín—.
—Son rosas, claveles y jazmines —contesta Lola—.
—Toque usted, don Joaquín, toque usted —dice Conchita, poniéndole la bandeja delante—.

—Conchita —dice don Joaquín extendiendo sus manos blancas, sutiles, y pasándolas con cuidado sobre las rosas, los claveles y los jazmines—, Conchita, has hecho cuanto puede apetecer para su consuelo un viejo poeta que ha amado las flores y que ya no puede verlas...

Prosigue a lo lejos el volteo loco y jovial de las campanas; estallan cohetes; se oye una música; el cielo diáfano se ha tornado oscuro, y parpadean las primeras estrellas.

Don Antonio se levanta de pronto y grita:
—¡Rafael! ¡Rafael!
Rafael se acerca y entra en el zaguán. Es un labriego; es el mayoral que don Antonio tiene en la Umbría.

—Rafael —le pregunta don Antonio—, ¿os vais esta noche, después de la procesión a la Umbría, o mañana por la mañana?

—Esta noche queremos ver los fuegos —contesta Rafael—; nos iremos mañana.

—Oye —observa don Antonio—, esta semana tendréis que labrar todas las piezas de la Herrada... meted bien las rejas en los cornijales. Y tendréis también que acabar de recoger toda la almendra que queda.

—Este Rafael —pregunta don Joaquín—, ¿será el hijo del tío Rafael, el mayoral que ustedes tenían antes?

—Sí, es el hijo —contesta don Antonio—.
—Rafael —le dice don Joaquín—, ¿tú no te acordarás de mí? ¿No te acuerdas de don Joaquín, verdad?

—No, señor, no —contesta Rafael con aire confuso, rascándose la cabeza—.
—Eras tú un mozuelo cuando yo iba a la Umbría... Dime, ¿hay aún delante de la casa aquellos olmos grandes? ¿Están hermosos? ¿Están verdes?

—Sí, aún están —contesta don Antonio—.
—Y ¿hay en ellos muchas cigarras? ¿Unas cigarras que cantan mucho? ¿No es cierto?

—¡Ya lo creo que cantan! —exclama Rafael—. Todo el día se lo pasan cantando. Los chicos les tiran piedras para que callen; pero yo les digo que las dejen, que ya vendrá el invierno y se morirán...

—Es verdad —replica don Joaquín—. Ya vendrá el invierno y se morirán...
Y para sí piensa: "Nosotros los poetas somos como las cigarras; si las calamidades y desgracias de la vida nos dejan, cantamos, cantamos sin parar; luego viene el invierno, es decir, la vejez y morimos olvidados, desvalidos".

Resuenan los estallidos de los cohetes; la procesión se acerca. Pasan bailando unos enanos; la dulzaina hace: *ti, tirí, ti*; el tambor hace: *tan, tarán, tan...*

Akcepto ĉe la Lordurbestro

La alta protektanto de la Kongreso invitis ducent reprezentantojn de la Universala Kongreso renkonti lin kaj aliajn altrangajn urbkonsilistojn lunde, la 2-an de aŭgusto 1971. La LKK decidis transdoni la invitilojn al la komitatanoj de UEA, membroj de la Akademio, prelegontoj de Internacia Somera Universitato kaj kelkaj aliaj aktivuloj de la movado.

Filatela ekspozicio ĉe la UK!?

La Loka Kongresa Komitato volonte akceptos proponojn de individuoj aŭ grupoj filatelistaj por elmontri interesajn (laŭtemajn) kolektojn de poŝtmarkoj kaj event. poŝtstampoj. Preferataj estos jam pretaj aranĝoj kun rilato al Esperanto, lingva problemoj aŭ la kongreslando.

Aplaŭdoj por la sonbendo

Vere sukcesa fariĝis la reklama kaj propaganda sonbendo pri Londono preparita de LKK-ano Peter Schilperoord (1, Heron House, Church Grove, Hamton Wick, Kingston upon Thames, Surrey, Britujo). Dum mallonga tempo alvenis multaj mendoj el diversaj landoj. Novaj mendoj por la sonbendo, same kiel por la kongresa afiŝo (ruĝkolora londona aŭtobuso) estas bonvenaj ĉe la supra adreso.

56 Congreso Universal de Esperanto

Londres, 31/7 - 7/8, 1971

Viaĝo organizado por la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto en colaboración con la Delegación de Viajes MELIA, en Zaragoza.

31-7-71

A mediodía, salida en avión JET "T" de Barcelona a Londres.

Almuerzo a bordo.

Llegada a Londres, aproximadamente, a las cuatro de la tarde.

Cena y alojamiento en el Hotel.

1-8-71 al 6-8-71

Medias pensiones en el Hotel.

7-8-71

Desayuno en el Hotel.

A mediodía, salida en avión JET "T" de Londres a París.

Almuerzo a bordo.

Llegada a París, aproximadamente, a las tres de la tarde.

Cena y alojamiento en el Hotel.

8-8-71 y 9-8-71

Medias pensiones en el Hotel.

10-8-71

Desayuno en el Hotel.

A mediodía, salida en avión JET "T" de París a Barcelona.

Almuerzo a bordo.

Llegada a Barcelona, aproximadamente, a las tres de la tarde.

Precio del viaje por persona: En habitación doble con baño, 16.160 pesetas.

Precio del viaje por persona: En habitación individual con baño, 18.000 pesetas.

Categoría de los Hoteles 1.ª B.

Informes e inscripción, en la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto. Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza.

Se admiten inscripciones hasta el 15 de junio de 1971.

Portland (Oregon), 29.7 - 5.8.1972

Alta Protektanto: Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Aliĝiloj kaj glumarkoj

Novaj aliĝiloj por la kongreso estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso. Estas riceveblaj ankaŭ 3-koloraj propagandaj glumarkoj ĉe la Libroservoj je prezo de po 0,50 gld por dek-marka folio.

Internacia Karavano

Jam pli ol 50 personoj el 10 landoj aliĝis al la aviadila karavano de UEA al Portland. Tiuj, kiuj ankoraŭ deziras profiti de la reduktita prezo de la flugo anoncu sin al F-ino M. H. Vermaas, komisiito por specialaj taskoj de UEA, Nieuwe Binnenweg II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Propagando pri la kongresurbo

Faldfolioj pri la urbo Portland kaj hotelo Hilton (la kongresejo) kun interesaj kaj utilaj informoj pri la prezoj, manĝaĵoj kaj loĝeblecoj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la kongreso. Generale oni povas konstati, ke la prezoj en Portland estas multe malpli altaj, ol en Novjorko, kaj fakte eĉ pli malaltaj ol en aliaj mondaj urbegoj.

Loĝeblecoj

Laŭ favora aranĝo kun la estroj de Hilton-hotelo en Portland, la hotelo servos kiel senpaga kongresejo kondiĉe, ke almenaŭ ducent kongresanoj mendos la liton en tiu hotelo. Apudaj eblecoj estas la litoj en Universitato de Portland kaj en Viking Hall de Portland State University. La detalojn anoncos la Oficiala Bulteno.

Postkongreso en San Francisco

La oficiala postkongreso de la 57-a UK okazos de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1972 en San Francisco sub la patroneco de la Urbestro. Kolora reklamfolio kaj detalaj informoj estas riceveblaj ĉe Esperanto - Informcentro, 410 Darrell Road, Hillsborough, California 94010, Usono.

Simbolaj aliĝoj

Esperantistoj, kiuj ne mem partoprenos la Universalan Kongreson en Portland, havas la eblecon manifesti sian moralan kaj finanĉan subtenon al la Kongreso per simbola aliĝo. La nomoj de simbolaj aliĝintoj estos enskribitaj en la Kongresa Libro de la 57-a UK. kaj ili ankaŭ ricevos ĉiujn presaĵojn de la UK. La minimuma kontribuo por la simbola aliĝo estas 30 gld.

HISPANA TURISMA ESPERANTO-SEKCIO

Sekcio de H.E.F.

Kiel anoncite en BOLETIN —novembro-decembro 1970— la Hispana Turisma Esperanto-Sekcio en kunlaboro kun Delegación de Viajes MELIA en Zaragoza, organizas komunan flugvojaĝon al Portland (Oregon - Usono), por partopreni en la 57^a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 29^a-7 ĝis la 5^a-8-1972.

En venonta numero de BOLETIN, ni informos pri la programo de la vojaĝo kaj ties prezo.

Informojn pri la vojaĝo vi povos ricevi de la Turisma Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, ĉe Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza-Hispanujo.

ESPERANTO EN KOMERCO KAJ TURISMO

En la urbeto Cullera, nia aktiva samideano José López Plazas ĵus starigis informan oficejon "Esperanto", kiu celas helpi nian movadon per siaj servoj.

Bonan sukceson al lia entrepreno, kies adreso estas:

Apartado 29

CULLERA (Valencia)

56 UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazonta en Londono de la 31^a, 7 ĝis la 7^a, 8, 1971

Sub la Alta Protektado de Lordurbestro de Londono Sir Peter Studd.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

Unua Bulteno kaj Aligilo:

Kvarpaĝa, grandformata, ilustrita Unua Bulteno kaj samtempe la aligilo por Londono estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe la kongresa peranto, Sro. Ramón Molera, Cefdelegito de U. E. A. en Hispanujo, str. Santa Joaquina, 13. MOYA (Barcelona) kaj ĉe la Hispana Esperanto-Federacio.

Statistiko (31.3.1971)

Entute 1391 aliĝintoj el 35 landoj. (el Hispanujo 44.)

INTERNACIAJ FERIAJ ESPERANTO-KURSOJ

Helsingor, Danlando

25/7 - 1/8 1971

- 1) Elementa Kurso, 2) Konversacia Kurso, 3) Perfektiga Studrondo,
- 4) Prepara Kurso por Friis-metodaj ĝeinstruistoj.

Ankaŭ estos bonvenaj feriaj gastoj en ĉi tiu semajno.

Aŭtunaj FERIAJ Kursoj okazos de la 17-a ĝis la 23-a de oktobro 1971 en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, bela regiono ĉe maro kaj arbaro.

Informoj: Sro. L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Abyhoj, Danlando.

INTERNACIAJ ESPERANTO KURSOJ KAJ FERIOJ EN BULGARIO

Dudek-tagaj Internaciaj Esperanto-Kursoj:

1. *Por ĝelernantoj en ripozloko "Pisanica" apud urbo Smoljan*
 - a) De la 12-a ĝis la 31-a de julio 1971 - por ĝelernantoj ĝis la 15-a jaraĝo.
 - b) De la 2-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1971 - por ĝelernantoj ĝis la 19-a jaraĝo.

En ambaŭ kursoj estos grupoj por komencantoj kaj progresantoj.

2. *Por aliaj dezirantoj en altmontara ripozloko "Pamporovo"*

De la 2-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1971 - estos grupoj por komencantoj, progresantoj kaj instruistoj.

Dekkvartagaj Internaciaj Esperanto-Ferioj en ripozloko "Pamporovo"

De la 6-a ĝis la 19-a de septembro 1971 - okazos pedagogia seminario, kursoj por lernado kaj ekposedo de Esperanto - nur por dezirantoj.

Detalajn informojn sendas DISTRIKTA ESPERANTISTA KOMITATO en urbo Smoljan, Bulgario.